

Geografia nomenklaturu, 11-a parto  
La sufiksoj -i kaj -uj  
Claude Gacond, 292-a radioprelego, 1969.05.14 & 17

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni vin atentigis pri la graveco de la debato malfermita de Tibor Sekelj per la eldono de *Mondmapo* kaj de propono de geografia nomenklaturu.

A.- Ni volas hodiaŭ reliefigi la ideojn, kies portantoj estas la sufiksoj **i** kaj **uj**.

Cl.- Por enkonduki nian temon ni sekvos etan ĉirkaŭvojon.

A.- René de Saussure difinis la esperantan vortkonstruon per la reciproka kontraŭstaro de du komplementaj principoj, la principo de neceso kaj la principo de sufiĉo.

Cl.- Vorto, kiu ne rezistas al la analizo bazita sur tiuj du principoj, forlasas la terenon antaŭ pli logikaj formoj. Ĝi iĝas arkaismo aŭ akiras pli limigitan signifon profite al novaj vortoj.

A.- La falsaj konstruoj **Holandujo**, **Kanadujo** estas hodiaŭ konsiderataj kiel arkaismoj propraj al la unua periodo de nia lingvo. La vorto **vagonaro** tendencas preni la signifon **aro da vagonoj** kaj nova radiko **trajno** sin trudis anstataŭ la primitiva signifo.

Cl.- La lingvo internacia iĝas pli kaj pli preciza per pli kaj pli atenta analizo de la signifoj de la kunmetoj kaj riĉiĝo en fakaj terminoj.

A.- Por resti en la geografia temo kaj por ricevi plian ekzemplon pri tiu analizo de la kunmetoj, ni provu analizi la kunmeton **homaro**, kiun ni ŝuldas al Zamenhof mem.

Cl.- La **ar**-vortoj ĝenerale analiziĝas jene :

A.- **Ŝafaro** estas **aro da ŝafoj** aŭ **grego da ŝafoj**.

Cl.- **Arbaro** estas aro da arboj aŭ **forsto**.

A.- **Birdaro** estas aro da birdoj aŭ **taĉmento da birdoj**.

Cl.- Sed **homaro** ne estas aro da homoj, sed la **homtuto**. Nenia logika analizo de tiu vorto **homaro** povas vere konduki al la nocio, kiun ĝi heredis de la zamenhofa uzo. Jen kiel la *Plena Vortaro de Esperanto* eldonita de SAT difinas la sufikson **ar** :

A.- « *Ar. Sufikso esprimanta kolekton da samspecaj estuloj aŭ objektoj, kiuj estas esence ligitaj inter si kaj formas unu apartan tuton, unu kolektivon objekton.* »

Cl.- Ni provu tiel difini la vorton **homaro** :

A.- Homaro : kolekto da homoj, kiuj estas esence ligitaj inter si kaj formas unu apartan tuton, unu kolektivon objekton.

Cl.- Ĉu tio ne estas preciza difino de la nocio **gento** aŭ **homraso** ?

A.- De si mem **homaro** signifas **genton**, **homrason**.

Cl.- Sed Zamenhof donis al ĝi alian signifon : **homtuto**.

A.- Tiu trudo ne respektis la principon de sufiĉo de De Saussure :

Cl.- « *En la vorto konstruata oni devas eviti la ideojn fremdajn je la ideo esprimota.* »

A.- Pro tiu nerespekto la vortaroj devas klarigi la ekzaktan signifon de la konstruo **homaro**. Ili devas nin atentigi, ke anstataŭ signifi **aron da homoj**, tiu vorto signifas **la tuton de la homoj**.

Cl.- Ni fakte troviĝas antaŭ idiotismo.

Geografia nomenklaturu, 11-a parto  
La sufiksoj -i kaj -uj  
Claude Gacond, 292-a radioprelego, 1969.05.14 & 17

A.- Por reveni al niaj **uj-** kaj **i-**sufiksoj ni provu konstrui la vortojn **homujo** kaj **homio**, kaj ni vidu, ĉu tiuj formoj povus pli bone esprimi la nocion **homtuto**. Tion farante ni provu malkovri la ekzaktan signifon de tiuj sufiksoj **uj** kaj **i**.

Cl.- Se ni provas analizi la vorton **homujo**, ni alvenas al la ideo de **Ujo por la homoj**. Tiu ideo vekas ĉe ni bildon sufiĉe kompleksan : Ni vidas ĉiujn homojn, kiuj estas grupigitaj en sama entenilo, en sama ujo. Do tiu vorto akcentas kaj la ideon de la homtuto, kaj la ideon de la loko, kie ili vivas, tio estas nia planedo Tero.

A.- Ni konstatas, ke tiu formo **homujo** konvenus nek por la nocio **homtuto**, nek por ties loĝloko : la Tero.

Cl.- Se esperantistoj uzus la vorton **homujo** por diri **homtuton**, tiu uzo estus kritikata. Se esperantistoj uzus la vorton **homujo** por diri **la planedon Tero**, tiu uzo ankaŭ estus kritikata. Fakte la vorto **homujo** samtempe signifas **homtuton** kaj **planedon Tero**. Voli forigi unu el la signifoj estas perforti la komunan lingvosenton de la esperantistoj.

A.- Ni nun forlasu tiun nekutiman vorton **homujo** por la pli kutima **Germanujo**. La ideo **Ujo por la germanoj**, kiun ĝi entenas, kondukas al la sama kompleksa nocio de **genttuto** kaj de ties **tero**.

Cl.- Ho ve ! Adolf Hitler ne konis tiun lingvon, kie la **uj-**vortoj vekas tiom da patriotaj sentoj. **Germanujo**, kie estas viaj limoj, kie finiĝas tiu ujo, kiu entenas la germanojn ? Ĉu en tiu ujo rajtas vivi negermanoj ? Jen respondoj, kiujn la **uj-**landnomoj neniam donos.

A.- Kaj nun ni venu al la formo **homio**. Laŭ la difino de la sufikso **i**, kiun ni donis dum la pasinta semajno, ni alvenas al la signifo : teritorio, lando, regno, mondo karakterizata de la homoj. Ni konstatas, ke la vorto **homio** ne plu akcentas la nocion **homo**, kaj pli akcentas la nocion **teritorio**. **Homio** antaŭ ĉio estas la planedo Tero, kie vivas la homoj, sed ne nur la homoj, ankaŭ la bestoj, la plantoj.

Cl.- En la vorto **homio** forestas tiu dueco, kiu troviĝas en la vorto **homujo**. La nebulo de la internaj sentoj malaperis. La homo ne plu okupas la ĉefrolon, li nur karakterizas teritorion. Gentaj sentoj malaperas profite al simpla geografia nocio.

A.- Same estus, se ni analizus la vorton **Germanio**.

Cl.- **Germanio** estas teritorio, lando, regno karakterizata de la germanoj. Tio ne plu liveras nebulan impreson, ke sur tiu teritorio vivas nur germanoj, kaj ke ĉiuj germanoj vivas sur ĝi. En lando karakterizata de germanoj estas tute nature, ke aliaj homoj ne germanaj povas vivi, kiel estas nature, ke germanoj povas vivi en landoj karakterizataj de io alia : de italoj : Italio, de la urbo Alĝero : Alĝerio, de la rivero Senegalo : Senegalio.

A.- **Homio**, kiu reduktiĝas al teritoria signifo kaj **homujo**, kiu kunigas gent- kaj ter-ideojn, ambaŭ ne povas konveni por la rolo **homtuto**. Ili ne kontentigus la principojn de neceso kaj sufiĉo de De Saussure.

Cl.- Pro tio eble la esperantistoj restas fidelaj al la idiotismo **homaro**, kiu estas vastigo de la logika signifo **aro da homoj**, ĝis la koncepto **homtuto**. La **uj-** kaj **i-**sistemoj estas ligitaj kun nocio pri spaco, kiu nekonvenas kun la esprimo **homtuto**, la zamenhofa **homaro**.

A.- Ili ambaŭ multe pli bone konvenas al la formado de landnomoj.

Cl.- La klaran **i-**sufikson ŝatas ĉefe scienco kaj teknikaj rondoj, turism-oficejoj, sennaciistoj. Kontraŭe verkistoj, poetoj, historiistoj preferas la **uj-**sufikson, kiu estas pli ŝarĝita je subjektivaj impresoj.

Geografia nomenklatur, 11-a parto  
La sufiksoj -i kaj -uj  
Claude Gacond, 292-a radioprelego, 1969.05.14 & 17

A.- Ambaŭ sufiksoj havas utilan rolon. En geografio la **i**-sufikso estas absolute kontentiga. Sed en la patriotaj proklamoj la **uj**-sufikso tute certe estas pli efika.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-